

la informilo

ISSN:
0291-
6037

INFORMBULTENO  PRI ESPERANTO

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

FEDERATION CULTURELLE FRANCE-EST POUR L'ESPERANTO

MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE Ph.DESFORGES

27, Rue de la République, F-54000 NANCY

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

NOUVELLE SERIE

trimestriel

4^{ème} trimestre 1990

N° 72



ABONNEMENT

un an: 45 FF

jara abono

por eksterlando:

57 FF aŭ 18 R.K°j

ANTO - FLASH... ESPERANTO - FLASH... ESPERANTO

Le grand rendez-vous mondial 1991 dans la capitale des fjords

On peut d'ores et déjà supposer que le 76^{ème} CONGRES UNIVERSEL de l'Universala Esperanto-Asocio (UEA) qui se déroulera du 27 juillet au 3 août 1991 dans la "capitale des fjords et des Vikings" connaîtra un succès mérité.

La beauté originale de la ville de BERGEN, admirablement située en bordure de mer, avec son lac central, ses espaces verts et le pittoresque unique du paysage environnant en font traditionnellement un lieu de séjour privilégié.

Le complexe culturel "GRIEGHALLEN" -du nom du célèbre compositeur, enfant de la cité-, à l'architecture moderne, situé à très courte distance de la plupart des hôtels, offrira aux congressistes tout le confort et les agencements techniques nécessaires.

Le programme élaboré par l'équipe d'accueil est particulièrement attractif. En dehors des multiples séquences de travail habituelles, concerts, prestations théâtrales et folkloriques (qui se dérouleront dans ce même Palais du Congrès) seront le gage d'une détente



BONNE ANNEE 1991 A TOUS NOS LECTEURS!



UNE LANGUE COMMUNE POUR L'EUROPE : le 8 décembre à 18 h, à la Maison de l'Europe à Nîmes, Pierre Janton parlera d'une langue commune pour l'Europe. Comme le signalait Claude Hagège en clôture des Etats Généraux des Langues, la question qui se pose est de savoir si une langue nationale (aujourd'hui l'anglais) a vocation à être internationale .



555 PROSPECTUS TOURISTIQUES en ESPERANTO : 62 régions, 21 pays ,323 villes ont choisi de se faire connaître par la langue internationale, sans parler des 46 moyens de transport (comme les chemins de fer norvégiens) et une centaine de brochures diverses.



ACCORDS ENTRE LIBRAIRIES : Afin de permettre aux pays de l'Est qui n'ont pas de devises de se procurer les livres édités à l'Ouest, la maison d'édition Edistudio (Italie) a conclu un accord avec les Polonais. Ils pourront acheter directement à Varsovie les livres édités à Pisa . Un autre arrangement a été fait avec une maison d'édition lituanienne .
A Pau, du 30 novembre au 2 décembre, l'espéranto était présent aux Journées Pyrénéennes du Livre .



EXPERIENCE PEDAGOGIQUE EN ESPAGNE : Augusto Caspuo de la Cruz prépare une thèse sur la valeur propédeutique de l'espéranto et a obtenu ce que les Français réclament en vain: enseigner d'abord l'espéranto et ensuite une langue étrangère (dans ce cas, l'anglais) afin de contrôler scientifiquement

- 1) si la connaissance de l'espéranto facilite l'acquisition de l'anglais;
- 2) si elle facilite l'apprentissage de la langue maternelle (dans ce groupe-témoin, le castillan ou le valencien)
- 3) si l'espéranto influence l'étude des autres matières



L'ESPERANTO DANS L'APPRENTISSAGE DES LANGUES : Pourquoi l'espéranto facilite-t-il tant les contacts et l'apprentissage des autres langues ? C'est la question à laquelle Claude Gacond, conférencier de Radio Suisse Internationale et archiviste au Centre de Documentation et d'Etudes sur les Langues Internationales de la Bibliothèque publique de la Chaux de Fonds (Suisse) a essayé de répondre à l'Université de Besançon le 9 novembre



PROVENÇAL ET ESPERANTO POUR UN LITUANIEN : spécialiste de provençal Algis Skupas (Lituanie) était invité par les félibres d'Avignon et d'Aix en Provence . Espérantiste, il en a profité pour rendre visite à certains centres culturels, Chambéry par exemple où il a accordé un entretien au Dauphiné libéré et à la radio locale; à Saint-Etienne où il a parlé de l'émission hebdomadaire en espéranto sur radio Vilnius



EN LIBRAIRIE : pour l'année internationale de l'alphabétisation, Tokio publie un livre d'enfants " Divenu, kion mi faras / Devine ce que je fais": c'est la rencontre avec 11 enfants de différentes parties du monde .
" 1825, le Complot " : les éditions du Progrès à Moscou publient le complot des Décabristes, illustré par Alekseev .
" Cina antologio / Anthologie chinoise " un recueil de nouvelles et d'essais, couvrant la période 1949-1979 .
" Gustumu vinojn / Goûtez les vins " est le premier dictionnaire français -espéranto sur ce sujet



LES VINGT ANS DE MONDA TURISMO: Pour fêter 20 ans d'activités touristiques et d'échanges internationaux par l'espéranto, Monda Turismo organise du 7 au 10 décembre à Cracovie " Les Journées de l'Espéranto", et du 9 au 16 décembre à Bruxelles et à Moscou un symposium "Le Tourisme en Europe par l'Espéranto"

fructueuse dans une ambiance internationale inégalée que seuls les pratiquants de la Langue Internationale peuvent savourer.

Bien évidemment le grand banquet et le bal international sont également au menu des festivités! Les enfants, selon une tradition bien établie et appréciée, tiendront leur "mini-congrès" dans un groupe scolaire moderne à quelques kilomètres de Bergen.

Pour tous ceux qui désireront connaître le pays plus en profondeur, un "pré-congrès" (du 25 au 27 juillet) permettra de découvrir les principales curiosités d'OSLO. En plus des excursions d'une demi-journée ou d'une journée qui agrémenteront les sessions de travail, un "post-congrès" de 3 à 4 jours, avec une croisière dans les plus beaux fjords du monde et un périple dans le massif montagneux intérieur complètera agréablement une séquence de vacances inoubliable.

LE CONGRES UNIVERSEL DE BERGEN...

UN GRAND MOMENT DE DETENTE CULTURELLE A NE PAS MANQUER!

INFORMATIONS COMPLEMENTAIRES: 1/ Le service "Tourisme" de l'UNION FRANCAISE pour l'ESPERANTO, 4bis Rue de la Cerisaie, 75004 PARIS, organisera comme chaque année des "caravanes" pour le Congrès.

2/ Le bulletin d'inscription au Congrès a déjà été inséré dans le précédent n° de "LA INFORMILO" (71).

LA LETTRE DE L'ESPERANTO

tél.:

(extraits)

MINITEL:

services: (1) 42 78 68 86

Un service de presse exclusif de

3615 ESPERANTO

infos: (1) 48 87 07 42

l'UNION FRANCAISE POUR l'ESPERANTO

4bis, Rue de la Cerisaie, 75004 PARIS

L'EUROPE DE L'EST EN HOLLANDE: les 27 et 28 octobre, à Bennekom; Pal Felso, journaliste hongrois, et Jir Proskovec (Tchécoslovaquie) ont présenté les changements politiques et économiques en Europe de l'Est, et répondu à un flot de questions!



L'ANNEE DE L'ALPHABETISATION: TEJO-Tutmonde (bulletin de l'Association Internationale de la Jeunesse Esperantophone) consacre plusieurs pages de son numéro d'automne au programme des Nations-Unies. Félicitations au Zimbabwe qui consacre 22% de son budget à l'alphabétisation. 26,5% de la population mondiale est analphabète, soit 948 millions de gens...



COMITE EUROPEEN DES ASSOCIATIONS D'INTERET GENERAL: Europa-Esperanto Unio est l'une des 7 associations européennes adhérentes et son représentant, Grégoire Maertens (Belgique) a été élu au Conseil d'Administration.



LA FUREUR DE LIRE: * La Bibliothèque de Metz (57) a acquis l'oeuvre complète de Raymond Schwartz en esperanto. Cet enfant du pays est connu pour sa chronique d'une famille alsacienne pendant la guerre ("Kiel akvo de l'rivero"/ Comme l'eau de la rivière) et ses spectacles de cabaret.

* "Kumeaùà, filo de la ĝangalo" / le fils de la jungle), de l'ethnologue Tibor Sekelj vient d'être publié en suédois et en ukrainien.

* "Kaùkazia Esperanto" /L'esperanto du Caucase en vente dans les bonnes librairies soviétiques est tiré à 30000 exemplaires.

* Deux millions de livres ont été édités en hongrois par l'Association d'Esperanto. On peut donc calculer que chaque famille hongroise possède un livre (par exemple un polar de Istvan Nemere) avec des explications sur l'esperanto.

⁴...dernière minute...

UNE PRESENTATION ATTRACTIVE DE L'ESPERANTO...

...sous forme d'une bande-vidéo (système SECAM) vient d'être réalisée par l'Union Espérantiste Française (4bis, Rue de la Cerisaie, 75004 PARIS).

Cette innovation répond à un double besoin de modernisation et de réactualisation du matériel informatif traditionnel. D'une durée d'environ 30 minutes, ce film qui s'adresse à un public varié, cerne la totalité du problème de l'intercommunication. Sa conception de départ laisse à l'animateur une grande souplesse d'utilisation. Le commentaire peut être écouté ou remplacé par celui du présentateur. Des chansons d'artistes espérantophones ponctuent les pauses qui peuvent être mises à profit pour des débats intermédiaires. Cette bande-vidéo sera sans doute un moyen efficace d'information auprès des associations, établissements d'enseignement, foyers culturels, firmes diverses, généralement équipés d'un magnétoscope.

Toute commande est à adresser à UFE (adresse ci-dessus). Prix: 180FF ou 200FF port compris.



SUCCES FLATTEUR DU STAGE CULTUREL...

... de la Ligue Sarroise d'Esperanto. C'est en effet plus de 100 personnes (123 inscrits dont 2 Chinois et 1 Soviétique!) qui se sont retrouvées du 7 au 9 décembre à HOMBURG, dans les locaux confortables et parfaitement adaptés de la "Kardinal-Wendel-Haus".

En dehors des cours de langue multiniveaux habituels, les linguistes confirmés ont participé aux trois conférences-débats animées par M. Yosimi UMEDA, Directeur de l'Institut Japonais d'Esperanto, lequel a permis aux participants de jeter un regard neuf sur le Japon d'aujourd'hui... et de perdre quelques préjugés!

Les stagiaires au grand complet ont assisté le samedi soir à une soirée musicale de haut niveau. Les quatre chanteurs-musiciens du groupe néerlandais "Kajto" (cerf-volant) ont remporté un véritable triomphe. Une grande partie de leur répertoire vient d'être enregistrée sur disque compact -le premier CD en espéranto!-

Le prochain stage de la SARLANDA ESPERANTO-LIGO aura lieu du 31 au 2 juin prochain.

EN DIRECT DE LA REPUBLIQUE LETTONNE



Dix-huit clubs d'espéranto accueilleront de fin janvier à fin février un nouvel "ambassadeur itinérant" de l'espéranto en la personne de M. POLAKS, lequel, enfin muni de son visa en bonne et due forme animera des soirées informatives sur la vie actuelle en Lettonie, documents audio-visuels à l'appui. Ces conférences-débats offrent le double avantage de faire mieux connaître d'une part le pays d'origine du conférencier et d'autre part de démontrer concrètement la valeur spécifique de l'espéranto en tant que langue mondiale d'intercommunication.

C'est à Bar-le-Duc que M. POLAKS terminera son tour de France avant de regagner son pays.



31ème STAGE "D'ESPERANTO PARLÉ"

NOTRE 31ème STAGE "D'ESPERANTO PARLÉ" aura lieu à la fin du mois de mai ou au début juin à Illzach à 5 km de Mulhouse. Les participants seront accueillis à l'Espace 110, qui est une MJC très moderne et où ont lieu actuellement nos cours d'Esperanto pour débutants. Dans le prochain numéro de **La Informilo** qui paraîtra au mois de mars 1991 vous trouverez toutes les informations et le bulletin d'inscription à ce stage. Tous renseignements pourront être obtenus auprès du groupe organisateur:

S-ro Robert KUENY
11, rue de Battenheim
68490 BANTZENHEIM

== agad-raporto de la grupoj de la federacio ==

(de septembro 1989 al junio 1990)

=====

MULHOUSE

- semajnaj kursoj por komencantoj: 4 personoj
- semajnaj kursoj por progresantoj (2a-grada): 7 personoj
- ĉeesto ce "Forumo de la Asocioj" en Mulhouse - februaro 1990
- budo ĉe "Ekologia Foiro" en Rouffach: majo 1990
- finsemajna staĝeto en majo 1990
- prezentado de ekspozici-materialo en Pulversheim kaj en biblioteko de Mulhouse
- sesio de 1a-grada ekzameno ("atesto pri lernado") - 4 sukcesintoj

NANCY

- LOKA REKLAMADO: 16 komunikoj en la gazetaro, 120 afiŝoj, 4000 flugfolioj
- parola kurso por komencantoj: 10 personoj
- 2a-grada kurso: 5 personoj
- paralele: 2a-grada kurso 2-foje monate: 4 personoj
"a-grada kurso 2-foje monate: 4 personoj
- partopreno en "Biologia Foiro" en Thaon (majo) - 1000 informiloj disdonitaj budo kun ekspozici-materialo. publika prelego far Sr° Simonnet
- staĝeto dum junio: 3 komencantoj
- sesio de 1a-grada ekzameno: 3 sukcesintoj
- = PERKORESPONDA KURSO: 43 komunikoj al gazetaro - 116 personoj petis informojn 32 aliĝis - 9 finlernis "Metodon 11"

THONVILLE

- partopreno en "Foiro de la Asocioj" kun ekspozici-materialo federacia, disdono de 500 "votre premier rendez-vous avec l'espéranto" (eldonaĵo de UFE)
- akcepto de prelegintoj kaj muzik-grupoj
- publikaj kunvenoj
- gazetartikoloj pri eksterlandanoj
- radio-elsendoj: dufoje unu horo

GERARDMER

- 2a-grada kurso por 6 plenkreskuloj
- 1a-grada kurso en "Gérardmer Accueil" - 5 gelernantoj

COLMAR

- prezentado de esperanto ĉe "Colmar Accueil" kaj ĉe loka radioelsendilo
- 1a-grada kurso: 3 komencantoj

BETSCHDORF

- ĉiumerkrede: 2 kursoj - 2 junuloj kaj 3 plenkreskuloj
- marto: prezentado de E° okaze de "Libertempa Salono"
- julio: staĝeto kun 3 personoj
- organizo de la printempa federacia staĝo
- akcepto de 2 grupoj el Germanio kaj Pollando

... ..

SPECIFA LABORO de la Prezidanto de la Federacio

- tradukado kaj eldonado de la rakonto: "La ronkanta avo"
- prelego ĉe "KIWANIS-Club International" en Munster

BAR-le-DUC

- publika informkunveno en urbdomo
- 1a-grada kurso (8 aliĝintoj) - 4 atingas la finon - la samaj finas la 2a-gradan
- 1a-grada kurso (8 aliĝintoj) - 4 atingas la finon kaj aliĝas al la 2a-grada (3 finas ĝin)
- oficiala elementa kurso ĉe "Institut des Forces de Vente 55" (anteno de la Ĉambro de Komerco) far Sr° Gilbert. La tuta teamo trapasas la unuan ekzamenon - 9 ricevas sian diplomon kune kun la diplomo de staĝfino okaze de publika protokolaĵo.


- akcepto de litova preleganto (Paŭlo JEGOROVAS) - publika prelego en salono de la urbodomo
- akcepto de la belga kantistino Nikolin'
- memorinda Zamenhof-vespero en januaro: 40 kg da diversaj varoj estas enpakigitaj kaj sendotaj al rumana familio.
- 2 plenkreskuloj fintrapasas la "Ateston pri Kapableco" en Grésillon... sukcese!
- 3 klubanoj partoprenas la nacian kongreson (UFE) en BLOIS

Protokolinto:
Roberto KUENY

NIAJ STATISTIKOJ

Jen la jam tradicia fin-jara grafiko, kiu montras en kiuj monatoj estis pagataj la abonoj al **La Informilo** en 1989/1990. Laŭ tiu grafiko oni povas rimarki ke, fine de januaro estis pagita nur 52 % de ĉiuj abonoj, fine de februaro 59 %, fine de marto 71 %. Kompare kun 1989, la rezultoj estas malpli bonaj krom en januaro. krome la nombro da abonantoj malkreskis kaj estas eĉ iom pli malalta ol en 1988. Estis respektive 223 247 kaj 222 abonantoj. Nia last-jara gajno estas denove perdita. Ĉu ni sukcesos en 1991 regajni tiujn perditajn abonantojn? Ni devos klopodi ne nur varbi novajn abonantojn, sed ankaŭ ne perdi la malnovajn. En 1990 ni gajnis 74 novajn abonantojn sed perdis 99. Por ne retroviĝi inter ĉi-tiuj, bonvolu senprokraste renovigi vian abonon, kaj eventuale pagi vian kotizon por 1991.

MONATA STATISTIKO PRI LA RICEVO DE ABONOJ por 1990



31-a STAĜO DE PAROLATA ESPERANTO

Nia 31-a STAĜO DE PAROLATA ESPERANTO okazos sabate kaj dimanĉe dum la monatoj majo aŭ junio 1991, en la moderna kultur-domo Espace 110 en Illzach je nur 5 km de Mulhouse, kie okazas jam nuntempe niaj Esperanto-kursoj por komencantoj. Pliajn informojn kaj la kompletan aliĝilon vi trovos en la venonta numero de **La Informilo** aperonta en marto 1991. Kompletaj informoj estas haveblaj ĉe la organizanta grupo, nome ĉe:

S-ro Robert KUENY
11, rue de Battenheim
68490 BANTZENHEIM

KOTIZOJ kaj ABONOJ 1991

Jen vi havas inter viaj manoj la lastan numeron de **La Informilo** por 1990, per ĝi, finiĝas via abono por ĉi-jaro. Tre verŝajne vi ŝatas ĝian enhavon, kaj grave taksas la klopodojn faritajn por ĝia eldonado. Certe vi daŭre deziras ricevi ĝin, ankaŭ en 1991.

Jen alvenis la momento por pagi vian jar-abonon al **La Informilo** por 1991. Bonvolu fari tion senprokraste, vi tiel faciligos la laboron de nia kasisto, kaj forigos la riskon ne regule ricevi **La Informilon**.

Vi atentu, ke via kotizo pagita al UFE neniam entenas la abonon al La Informilo. Sed vi iĝas aŭtomate membro de nia federacio, kondiĉe ke vi loĝas sur la federacia teritorio (*departementoj 54 55 57 67 68 88*) aŭ en apudaj landlimaj regionoj. Se via adreso estas ekster tiuj regionoj, aŭ se vi ne intencas aliĝi al UFE, bonvolu sam-okaze pagi vian federacian kotizon je 24 FF por iĝi aŭ resti federacia membro.

Ni ankoraŭ ne ricevis la tarifojn de la UFE/UEA-kotizoj, tial vi trovas ĉi-kune nur tiujn de la federacio. Se en 1990 vi jam estis membro de UFE, vi ricevos de ĝi kotizo-alvokon por 1991. En la venonta numero troviĝos la kompleta kotiz-tabelo.

Abono al La Informilo por enlandaj adresoj		45 FF
Abono al La Informilo por eksterlando	18 Rpk aŭ	57 FF
Federacia kotizo		24 FF
Bankkostoj, se vi pagas per bankĉeko el eksterlando		20 FF

Bonvolu ĝiri la koncernan sumon al la poŝtĉekkonto de nia Federacio:
FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO PCK 1997 72W NANCY

Aŭ rekte al mia adreso:

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM,
Francio



COTISATIONS ET ABONNEMENTS POUR L'ANNEE 1991

Vous venez de recevoir, pour l'année 1990, votre dernier bulletin d'information sur l'Esperanto, **La Informilo**. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement (4 numéros par an) pour 1991. Nous n'avons pas encore eu le tarif des cotisations UFE/UEA, c'est pourquoi vous trouverez ci-après uniquement ceux de notre fédération et nous vous invitons à les payer dès maintenant.

Nous espérons vivement vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres. Nous vous rappelons, que les cotisations payées à l'UFE ne comprennent jamais l'abonnement à **La Informilo**, mais vous permettent de devenir membre de notre fédération si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.

Abonnement al La Informilo		45 FF
Adhésion simple à la fédération		24 FF

Ces sommes peuvent être payées de préférence par virement CCP à:
FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO CCP 1997 72W NANCY
Ou par chèque bancaire à l'ordre de cette même fédération, mais adressé à notre trésorier:

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM,



 ☆
 ...EN MULHOUSE

Fine de septembro okazis nia unu-taga staĝo en la moderna kultur-domo Espace 110 en Illzach apud Mulhouse. Tamen ĉi-foje la sukceso ne estis tiom granda kiel por la du antaŭaj staĝoj okazintaj en septembro 1989 kaj en majo 1990. Malgraŭ tio ni sukcesis starigi novan unua-gradan kurson gvidatan de s-ro Kueny en Illzach, kun kvin novaj gelernantoj. Iom poste, komence de oktobro komenciĝis nia dua-grada kurso en Mulhouse kun 7 gelernantoj. Ĝi same okazas ĵaŭde vespere kaj estas gvidata de s-ro Grossmann.

La 21-an de oktobro kun s-ro Barrier, ni estis en Luze, vilaĝeto inter Belfort kaj Montbéliard, kie ni prezentis la federacian ekspozicion. Okazis tie Pomo-foiro, ni-mem havis nur malgrandan lokon en ĉambreto kaj povis montri nur unu flankon de la paneloj. Ni tamen kolektis preskaŭ 30 adresojn kaj vendis 14 verdajn libretojn. Kvankam en tiu regiono estas ege malmulte da Esperantistoj, plej multaj niaj vizitantoj sciis, kio estas Esperanto. Ni vidos estonte, ĉu nia semado donos fruktojn.

ACEP estas kultura asocio en la potas-mineja regiono inter Mulhouse kaj Guebwiller. Pro radio-elsendo okazinta ĉi-printempe, la urbestro de Pulversheim proponis al ni starigi Esperanto-kurson en la kadro de ACEP. Tion ni faris, kaj inter la diversaj kaj multnombraj kursoj efektive troviĝas ankaŭ Esperanto. Tamen ĝis nun, nur ege malmulte da homoj enskribiĝis. Komence de novembro ni havis la eblecon starigi en la urbodomo de Pulversheim nian ekspozicion por tuta semajno. Ĉu tio alportas pliajn lernantojn? Momente ankoraŭ ne estas decidita ĉu tiu kurso povas okazi aŭ ne, ĉar normale devus esti dek aliĝantoj.

Jen sukcesoj, kaj ne-sukcesoj en nia Esperanto-grupe, aŭ ĉu ni optimiste diru, ke temas pri prokrastitaj sukcesoj.

A. Grossmann

Plie la grupo sukcesis kontakti kaj interesigi la estraron de la kolegio "Gambetta" en RIEDISHEIM (apud Mulhouse). Ek de oktobro okazas kursoj ĉiusabate matene propravole kaj ĝoje gvidata de Roberto Kueny... al 15 (!) gejunuloj 14-jaraĝaj.

 ☆
 BAR-le-DUC

Publika informkunveno anoncita per gazetartikolo kaj lokaj radioj arigis.. 3 personojn! Estis tamen decidite provi malfermon de la-grada kurso post sendo de 2 afiŝetoj kaj specifa cirkulero al 30 selektitaj edukejoj, kulturaj kvar-talcentroj kaj asocioj. Anoncis la eventon tre trafa gazetartikolo. 4 personoj aliĝis.

Cetere 6 aliaj partoprenas 2foje dummonate, "konversaci-rondon!"

Menciindas la nova oficiala kurso ĉe "Institut des Forces de Vente 55", daŭre zorgata de Sr° Gilbert, Direktoro de la Ĉambro de Komerco departementa. La klubo kunvenas regule la 2an merkredon de ĉiu monato. Post giganta kaj persista laboro de Sr° Gilbert, la "Groupe des Espérantistes Meusiens" ĵus eldonis allogan libreton verkitan pollingve, tradukitan esperanten far pola amikino... Ĝi estas nun disponebla je la libro-servo federacia kaj disvendata profite al la tradukintino, kiu emus viziti nian landon... "Aventuroj de Kajĉjo" (cikoni-eto!) plaĉos al ĉiuaĝaj legantoj! Ilustris la verkon P. Denis.

 ☆
 NANCY La kutime abundaj raportoj pri loka agado kaj pri la perkorespnda kurso aperos en nia venonta numero.

THIONVILLE ☆

Por la dua jaro de sia partopreno en la Festo de la Asocioj, la esperanto-klubo de la lernejo Charlemagne prezentis sloganon: "Liceo Charlemagne ŝatas la lingvojn". Ĉiuj instruistoj pri angla, germana, itala, portugala, rusa, latina kaj greka prezentis ilustritan panelon, kaj ankaŭ evidente la esperanto-klubo pri esperanto. Tiu slogano altiris la atenton precipe de la politikistoj. Estis distribuitaj 500 "Premier rendez vous" de UFE, t.e. ĉiu familio, preterpasante la budon ricevis po unu ekzemplero. Estos lotumataj la revenintaj "Premier rendez-vous": la gajninto ricevos la sakon de la Universala Kongreso en Kubo.

La kurso pri esperanto komenciĝis la 2an de oktobro; ĝi okazas marde de la 13a ĝis la 14a.

METZ ☆

E. De Zilah, komitatano pri kulturilatoj de OSIEK informas, ke la Organiza Societo de Internaciaj Konferencoj honoris la japanan verkiston RIHEJ NOMURA, pro lia filologia verko: ZAMENHOFA EKZEMPLARO, per la PREMIO-OSIEK-1990. Ĉi-tiu premio estas je 300 ekuoj.

TRIBUNA

Anul CVI, nr. 238

Esperanto la Universitato din Sibiu

— precizări făcute de domnul Vasile ALBU, președintele filialei Sibiu a Asociației Române de Esperanto —

altor asociații asemănătoare din Polonia și Ungaria —
joi, 11 octombrie 1990 în sa-

Nia amiko Vasile ALBU estis intervjuita antaŭ nelonge far loka gazetisto de SIBIU. Interesos niajn legantojn la aktuala agado de niaj rumanaĵ samideanoj...

= Sr° Vasile ALBU, kiaj novaĵoj intervenis en la agado de filio SIBIU de la R.E.A.?

-Sur la bazo de interkonsento aranĝita la 22an de majo, ĉi-tiun jaron, inter la Rumana Ministerio pri Klerigado kaj la Akademio Internacia de la Sciencoj (A.S.) en San Marino, kiel ankaŭ de la aldonaj interkonsentoj starigitaj la 1an de oktobro en Sibiu, inter AIS kaj la Universitato de Sibiu, samtempe kun la malfermo de la universitata jaro, fondiĝis filio de AIS en Sibiu.

= Kiajn specifajn agadojn disvolvis la filio AIS-Sibiu, de la inaŭguro ĝis hodiaŭ?

-En kunlaboro kun iuj fakultatoj el la kadro de la Universitato en Sibiu oni organizis sesion de kursoj (dum 2 semajnoj), gvidataj de Prof. Dr° Helmar FRANK, el PADERBORN, Germanio, Prezidanto de AIS. Mi montrus ja kelkajn el tiuj-ĉi: "Kibernetikaj bazoj de la Pedagogio", "Elementoj de la informaci-teorio", "Enkonduko en la kibernetikan psikologion", "Propedeŭtiko de la kibernetika pedagogio", ktp.

Paralele kun ĉi-tiuj kursoj Prof. Frank tenis esceptan intensan kurson de Esperanto, ĉe kiu partoprenis ankaŭ universitataj didaktikaj kadroj, kaj Prof. Sara Reisenauer prezentis al gekursanoj kelkajn simplajn, koncizajn kaj efikajn manierojn lerni ĉi-tiun lingvon. Komence la prelegoj estis tradukitaj sammomente el E° en la rumanan lingvon far Prof. S. Reisenauer el Sibiu kaj Ana Vrajitoru (el Universitato "A.I. Cuza" Iasi).


Celante al la kunordigo kaj disvolvado de la kunlabora agado inter AIS-Universitato el Sibiu kaj por pretigi la fondigon de AIS-RUMANIO, konforme al la rumana leĝaro kaj laŭ la modelo de AIS-Germanio kaj de aliaj samaj asocioj el POLLANDO kaj HUNGARIO, okazis ĵaŭdon la 11an de oktobro en la salono de la student-restoracio la estiĝa konstitua kunveno de la sekvanta komitato: Direktoro: Prof. Dr° Florian I. Bociort (Universitato Timișoara), Prezidanto de REA, Vic-Direktoro-preleganto Dr° Ingen. Moise Tuturea, Prorektoro de la Universitato de Sibiu, komitatoj al kiuj oni aldonis multnombrajn membrojn (Dr° A. Huditean, universitata lektoro en Sibiu, Sara Reisenauer, H.O. Stamp, adjunkto de la ministro pri klerigado, M. Moga, universitata lektorino, Vasile Albu, prezidanto de la filio SIBIU de REA, Ana Vrajitoru, universitata lektorino Iasi, M. Preotu, bibliotekistino ĉe Rumana Akademio) kaj ankaŭ 5 deĵorantaj membroj-studentoj (M. Bucuta, I. Dicu, P. Marcu, M. Munteanu, A. Brate). La oficialaj laboraj lingvoj estas esperanto, la rumana kaj la germana.

= Kion vi proponas por la estonteco?

-Varbi novajn membrojn en la Internacia Scienca Kolegio (ISK) kaj asekuri daŭrige bonan disvolvigon de la esperanto-kursoj en la kadro de la Universitato de SIBIU, tiel por la studentoj kiel ankaŭ por la universitataj kadroj, kiuj deziras iĝi membroj de ISK.

= Ni diras al vi sukceson!

**pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...**



**nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...**

76-a Universala Kongreso de Esperanto

27-a julio – 3-a aŭgusto 1990
Bergeno, Norvegio



Invito al la fjorda nordo

Sen granda risko erari, jam nun oni povas profeti, ke la 76-a UK en Bergeno estos io speciala. Estas tie ĉiuj kondiĉoj por kredition: la urbo mem estas unike bela, kun sia spektakla geografia situo sur mildaj fjordo-deklivoj kaj montetoj, kun lago meze, amaso da verdo, riĉa historio kaj rava ĉirkaŭaĵo. La kongresejo estas impona, moderna arkitektura verko, bela kaj taŭga, situita en la urbocentro mem, kun pluraj hoteloj proksime. La LKK ne estas multnombra, sed ja kapabla kaj agema. La jam preparata kongresa programo aspektas riĉe kaj promesplene.

Se vi aliĝos al la Kongreso, vi certe ne bedaŭros tion. Memoru ankaŭ, ke vi ne devos ŝviti en la subtropika klimato, sed povos ĝui freŝan aeron, purajn kaj viglajn stratojn en mezgranda urbo, kie oni facile hejmiĝas. Memoru ankaŭ, ke Norvegio estas en Skandinavio, najbare al kelkaj aliaj landoj kun interesa kulturo kaj vigla Esperanto-movado. Ĉu necesas pliaj kialoj por vojaĝi al la eŭropa nordo?

La kongresprogramo provos esti nova, sekvante tamen tion, kio en nia kongresa tradicio estas konservinda. Vi spertos interesajn kunvenojn, kaj ĝuos belajn koncertojn kaj teatrajn spektaklojn en la komforta Grieg-halo, nia ĉi-foja kongresejo. Tiu centro nomiĝas laŭ la mondfama komponisto Edvard Grieg, kiu naskiĝis kaj vivis en Bergeno. Vi ĝuos ankaŭ pli intimajn kunestadojn dum la kulturaj programoj en la Studenta Centro; vi dancos bale, bankedos, amikos internacie, aŭdos klerajn prelegojn, ĉeestos aŭ mem partoprenos viglajn diskutojn, vagos tra la urbo, ekskursos en ĝian ĉirkaŭaĵon...

Norvegio estas lando kun granda kulturo. Pecojn el tiu heredaĵo vi povos ĝui dum la nacia vespero, kie oni prezentos norvegan muzikon, fragmenton el la versa dramo *Peer Gynt* (ĉefverko de Ibsen) en Esperanto, la faman Hardanger-violonon, norvegan folkloran dancadon kaj aliajn erojn.

En la kongresejo vi trovos, krom la bela, moderne ekipita granda salono, ankaŭ vastajn kaj komfortajn vestiblojn, kie eblas ripozi, promeni, manĝeti, babili kaj simple ĝui la etoson. Pluraj aliaj kunvensalonoj troviĝas tie. En la muzika lernejo, tuj apud la kongresejo, ni uzos plurajn salonetojn por fakaj kunvenoj, sed tie la artistoj povos ankaŭ senĝene provludi. La Studenta Centro, kie ni luas plurajn mezgrandajn ejojn, estas je nur 5-minuta promendistanco. Ni provos tie funkciigi ankaŭ la vastan restoracion, por la kongresanoj kiuj devas atenti sian restadbuĝeton en Bergeno.

Bergeno – la ĉefurbo de la fjordoj

Kvankam malnova urbo kun riĉa historio, Bergeno impresas moderne. Kun iom pli ol 200 000 loĝantoj, ĝi restas intima kaj promene explorebla. Tamen, ankaŭ nun ĝi estas la plej grava loko de la okcidenta marbordo de Norvegio, kiu ja havas sudan, se ne orientan marbordon. Antikva – fariĝis urbo en 1070 – iama

ĉefurbo de Norvegio, Bergeno ĉiam restis vigla kaj gastama! Ĝi elkreskis tie, kie la Gofla Fluo kondukas la varmon de la sudo al la bordoj de la nordo. Grava komerca urbo, ŝiptrafika haveno, kultura centro, kiu turnas sin al la tuta mondo kiel sia ĉirkaŭaĵo, Bergeno tradicie estas urbo malfermita al ĉiuj kontinentoj, kio faras la vivstilon kaj la mondkoncepton de la bergenanoj tre internaciaj. Pri tio la bergenanoj aparte fieras!

Vi ne devas laŭdi Bergenen al ties loĝantoj. Ili mem konscias pri la beleco kaj avantaĝoj de sia urbo, kaj ili volonte helpos, ke ankaŭ vi konatiĝu kaj profitu de ili.

Unu apud la alia, en ĉi tiu urbo harmonie kunvivas la granda historio de la urbo kaj la moderna epoko kun evoluitaj industrio kaj komerco, flugtrafiko, ŝiphaveno, butikoj kaj bazaroj. Ĉirkaŭe troviĝas rara belo de la norvega marborda naturo: fjordoj, riveroj, montoj kaj valoj. En la valoj floras fruktarboj dum la neĝa blanko ornamas montpintojn. Rava vidaĵo!

Atingi Bergenen estas facile: per ŝipo de Britio, Nederlando aŭ Danio, per trajne de tuta Eŭropo, aviadile al flughaveno Flesland de Bergeno, per aŭtobuso trans la montojn, per propra aŭto – aŭ eble per biciklo? Certe, Bergeno indas la vojaĝon, kaj estas ideala kongresurbo, precipe por internacia kongreso kiel la nia. Ĉar Bergeno kombinas la du trajtojn: esti norvega urbo, sed egale multe internacia laŭ sia karaktero!

Norvegio havas nur sudon kaj nordon

Iom pli ol 4 milionoj da norvegoj vivas sur la areo de preskaŭ 324 000 kvadrataj kilometroj. Laŭ la areo Norvegio estas iom pli granda ol Italio, sed la loĝantaro de Italio estas 13-oblo de la norvega. Romo eventuale estas pli proksima al Oslo ol la plej norda parto de Norvegio. Oni malofte konscias pri la norvega senco de distancoj sur la linio nordo-sudo. Eble Ĉilio komprenas Norvegon.

La lando de la 76-a UK certe ŝajnas iom aventura por multaj kongresanoj. Ĝi situas longe for en la nordo de Eŭropo, kaj kelkaj eble imagas ke ĝi estas vintra tra la tuta jaro, ke la blankaj ursoj promenas ĉirkaŭe. Sed ne tiel estas! Somere, kaj precipe en aŭgusto, kutime estas varma vetero kun sunbrilo kaj la karakterize helaj somer-noktoj de la nordo.

Sed Norvegio certe estas iom speciala malnova ŝtato, kreiĝinta ĉ. la jaro 900, sed sendependa en sia nuna formo nur de post 1905. Ĝi travivis multajn interesajn epokojn, estis kunigita kun Danio dum 400 jaroj, poste en unio kun Svedio ĝis ĝi en 1905 fariĝis memstara parlamenta monarkio. Norvegio estas demokrata ŝtato, la reĝo nomiĝas Olav La Kvina, sed la decidpovo kuŝas ĉe la nacia parlamento "Stortinget". Norvegio hodiaŭ estas moderna lando, kun modernaj teknikaj profesioj, sed ankaŭ kun terkulturado, fiŝkaptado, ŝiptrafiko kaj nafto-eksploatado kaj petrol-industrio en la Norda Maro – nur por citi kelkajn el ili.

Norvegio estas varia kaj bela laŭ naturo: oni povas sperti ĉiujn kvar jarazonojn en tiu lando samtempe. Bergeno estas perfekta specimeno de la norvegaj klimato kaj pejzaĝo. Tuj apude oni ravite gapas al la fjordoj, tiu tipe norvega fenomeno, tiu scenejo de la fascina batalo inter tero kaj maro. Se juĝi laŭ la nombro de la fjordoj en Norvegio, la maro iom post iom gajnas en tiu eterna batalo.

Por ni Norvegio estos interesa ankaŭ lingve, ĉar nur specialistoj konscias, ke la lando fakte estas dulingva, pli pro la du variantoj de la norvega, ol pro la fakto, ke en la nordo de la lando loĝas ankaŭ iom da laponoj.

Lando kun vigla E-movado

Nur unu fojon antaŭe okazis Universala Kongreso en Norvegio: en 1952 en Oslo. Nun, preskaŭ kvardek jarojn poste, norvegaj esperantistoj ĝojas gastigi la 76-an UK en Bergeno. Norvegio ne havas multajn loĝantojn; tial ankaŭ la Esperanto-movado estas modesta laŭnombre, sed persista kaj solida. Ĉiam ĝi prezentis fortan subtenon al UEA.

Norvega Esperantista Ligo (NEL) fondiĝis en 1911. Ĝia membronombro multe variis intertempe. En 1989 NEL havis proksimume 500 membrojn. La 30-aj jaroj estis la jaroj de la kresko: multaj eksterlandaj instruistoj tiam vizitis Norvegon, instruinte laŭ la alloga kaj efika Ĉe-metodo. Post la milito ne nur la britoj kaj usonanoj venkis – sed ankaŭ ilia lingvo, la angla. Ĝi fariĝis la unua fremda lingvo en la norvegaj elementaj lernejoj. Eble natura evoluo, tamen malfacila situacio por Esperanto. Dum la 50-aj jaroj la movado iom ekfloris, parte dank' al la kongreso en Oslo (kun pli ol 1600 aliĝintoj).

La norvega Esperanto-movado aktivis kaj aktivis. Oni eldonas librojn, oni verkas kaj tradukas, agas turismokampe, aranĝas internaciajn ferisemajnojn, instruas kaj kursas. Ĝi havas efikan gazetaran servon kaj informan fakon. NEL aĉetis propran oficejan spacon en la ĉefurbo Oslo. La norvega esperantistaro bone kunlaboras kun aliaj nordiaj asocioj kaj ankaŭ kun la fervojista organizaĵo NEFA, la norvega sekcio de IFEF, kies kongreso okazis en Norvegio en 1990. Ĉio ĉi donas certan garantion ke en Bergeno vi ĝuos komfortan, bone organizitan kaj etosplenan kongreson!

Antaŭkongresi en Oslo

Norvega Esperantista Ligo organizas interesan dutagan antaŭkongresan viziton al Oslo (25-27 julio), kun vizito al la ĉefaj vidindaĵoj de la norvega ĉefurbo. Estas tie multo por sperti kaj vidi: vikinga ŝipmuzeo, unika subĉiela galerio kun tuta centoj da skulptaĵoj de la fama artisto Vigeland, aro da aliaj muzeoj, artgalerioj ktp. Ĉi tiu aranĝo aparte taŭgas por la kongresanoj kiuj ĉiukaze devos traveturi la ĉefurbon pro flugaj aŭ trajnaj konektoj. Post la antaŭkongreso, kiu havos nur turisman karakteron, oni aranĝos komunan trajnvojaĝon al Bergeno tra la pitoreska kaj

varia norvega pejzaĝo.

Oni planas ankaŭ aliajn antaŭ- kaj postkongresajn ekskursojn, pri kiuj detale informos la Dua Bulteno.

Komforta loĝado en Bergeno

La Dua Bulteno ofertas vastan elekton de loĝeblecoj; kiu inkluzivos la plej luksajn hotelojn (ne tro multekostajn por sia kategorio), plurajn mezprezajn hotelojn, kaj kelkajn eblecojn de malmultekosta loĝado, inkluzive de amasloĝejo kiu kostos ĉ. 10,- NLG tage. Estas tie ankaŭ junulargastejo kaj studenta hotelo. La plimulto de la hoteloj kaj la amasloĝejo troviĝas en promendistanco de la kongresejo. La aliaj havas bonan trafikalan ligon kun la urbocentro. Norvegoj havas sian vivstilon kaj oni povas certi, ke la loĝado en Bergeno estos komforta eĉ kiam oni ne povas mendi la plej atklasan hotelon. Pli konkretajn detalojn alportos la Dua Bulteno, kaj la mendilo kiu akompanos ĝin.

Ekskursoj buse, trajne, ŝipe . . .

La ĉirkaŭaĵo de Bergeno estas aparte vizitinda, kaj estos organizitaj pluraj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj al la najbaraj fjordoj, al montoj kaj valoj, al arbaroj kaj lignaj kirkoj, kaj al monumentoj de la norvegaj historio kaj kulturo. Kompreneble, ankaŭ la promenoj tra la kongresa urbo mem estas inkluzivitaj. Eblos ekskursi ŝipe tra la fjordoj por ankaŭ tiamaniere sperti la landon de vikingoj, la fjordujon de la mondo. Krome, ni planas plurajn tri-kaj kvar-tagajn postkongresajn ekskursojn tra la fjordoj ĉirkaŭ Bergeno kaj la montaro survoje al Oslo.

Infana kongreseto estos bela

La infana kongreseto en Bergeno havos tre konvenajn kondiĉojn por sia laboro – aŭ ludo, se esti pli preciza. Ĝi okazos en lernejo kelkajn kilometrojn for de Bergeno. Pluraj norvegaj firmaoj jam decidis subteni la kongreseton per donacoj de siaj produktoj (sukoj, dolĉaĵoj k.s.). La infanoj estos bone prizorgataj de internacia teamo gvidata de UEA-komisiito por infanaj aferoj, s-ro Kristoforo Fettes (St. Columba's College, Rathfarnham, Dublin 16, Irlando). Ĉiuj informpetoj kaj aliĝoj iru al lia adreso, sed la pagoj direktiĝu al Roterdamo.



Château de Grésillon à 49150 BAUGE (PROGRAMME 1991)

